# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

*5, Quai Vauban* - 66-**PERPIGNAN** (P.-O.) - *Telefono 34-38-84*

Jara Abono : 3 F. – C. C. P. 956-28 Montpellier

N° 36 ---------------------------------- oOo ---------- 3a & 4a Trimonato 1970


## RAPORTO PRI LA KOMITATA KUNVENO de la 26-a de APRILO en PERPIGNAN

=O=

Kiam la publika kunveno de nia jara kongreso estis finita, S-roj LLECH-WALTER, DELIGNE, ANGEVIN, D-ino Yvette VIERNE kaj mi-mem denove kunsidis, de la dek-unua kaj duono ĝis la dek-dua kaj duono, por diskuti pri la federacia administrado.

Post la eksiĝo de S-ro ANGEVIN el sia posteno de Kasisto kaj lia akcepto esti vic-sekretario, nia nova komitata estas la jena :

- Prezidanto : S-ro René LLECH -WALTER, 5, quai Vauban- PERPIGNAN
- vic-Prezidantino : D-ino Yvette VIERNE, 5 rue Dr Roux - MONTPELLIER
- Sekretariino : F-ino Monique VERRY, 22 rue La Fayette -PERPIGNAN
- vic-Sekretario : S-ro Lucien ANGEVIN, rue B. Lazare- 3OLE CAILAR
- Kasisto : S-ro Maurice DELIGNE, 3 c,rue RAMADIER -NARBONNE
- Vic-Kasistino : F-ino DONY, Impasse des Aiguerelles, Av Pont - Trinqat 34 - MONTPELLIER
- delegito pri la bulteno : S-ro FRUS, 2 M 996 - Z U P - 30 - NIMES

mankas ankoraŭ unu komitatano kiu devus loĝi en la departamento"GARD"

Dum la kunsido, la estraro

- decidis propagandi, en la regiona gazetaro, pri la Skolta Esperantista Ligo ĉar en 1971, la skoltoj havos internacian ĵamboreon kaj kampadon ĉe Monto Fuĵi kaj, estos la internacia skolta jaro kaj ... esperanto estos la labora lingvo de tiuj gravaj junaj manifestacioj.
- unuvoĉe aprobis la ĉi-suben deziresprimo kiun ni sendis al U.F.E. :

" La Federacio " Langvedoc-Rusiljono" ĝojas pri la sukceso de la
" esperanto-kurso dum 1969-1970 en la Federacio " Centra Montaro".

" Ĝi varme gratulas P-ron JANTON pro la kurso kiun li malfermis ĉe
" ĉe Beletra Fakultato de Clermont-Ferrand kaj pro la kurso kiun li
" dissendis ĉe la regiona televido.

" Ĝi tute aprobas S-ron Roger BLANC, Prezidanto de tiu Federacio, pro

la klopodoj kiujn li faris apud la estraro de U.F.E. en la celo obteni :
- de la Nacia Edukada Ministro ke li donu sian konsenton al ĉiu duagrada lernejestro, kiu proponos la "pedagogian eksperimenton " ke Esperanto fariĝu,en oficiala horaro,elektebla lingvo en la sesa transira klaso aŭ en la normala klaso .-

" La Esperanto-Federacio "Langvedoko-Rusiljono" alvokas ĉiujn grupojn de la regiono por ke ili zorgu pri racia organizado de kursoj same kiel en la "Centra-Montara Federacio".-

M . V .

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN MANLLEU

La dimanĉo 21-an de junio, 200 katalunaj samideanoj kunvenis en MANLLEU,apud VICH, en la Barcelona Provinco.

Je la deka kaj duono okazis la inaŭguro de la Strato "Esperanto" ( en nova kvartalo).-Antaŭ, okazis la Diservo kies celebranto estis Pastro CASANOVAS, kaj lektoro Abato CLARAMUNT ; ĉiuj kantoj,preĝoj kaj prediko estis diritaj en internacia lingvo.-

S-ro José ARQUI-GRANI , urbestro de Mannlleu, malkovris la novan plakon kaj prononcis kelkajn vortojn en kataluna lingvo.-La organizantoj petis S-ron René LLECH-WALTER , kiel Vic-Prezidanto de U.F.E., respondi al la urbestro. Li dankis en kataluna kaj en esperanta lingvoj.-

Je la dekdua k duono, la partoprenantoj vizitis la ekspozicion "La Libro Esperanto" kiu estis organizita en salono de la ŝpara banko.

Je la dek-tria, la ĉeestantaro povis aŭskulti prelegon pri "Esperanto kaj Kulturo".-Tiu propaganda prelego estis farita en hispana lingvo pere de registrita senbendo kaj diapozitivoj.

Je la dek-kvara kaj duono,ĉiuj retrovis sin por amika manĝaĵo. Dum la deserto,la Prezidanto de la Komitato donis la parolvicon al S-ro René LLECH-WALTER kiu memorigis la homaman agadon de la Katalunaj Esperantistoj

Por danki la organizantojn,li ankaŭ deklamis poemon kiun li verkis en kataluna lingvo : "Balado pri la Vinoj de Banyuls".-Tiu poemo ricevis premion okaze de la Franca Kataluna Festo : "Florludoj de la Ora Ginesto"

Gesinjoroj Maurice DELIGNE el Narbonne partoprenis ankaŭ tiun manifestacion kiu finiĝis en poezia kaj gaja etoso.-

R . LL-W.

-:-:-:-:-:-:-

## KASTELO GRESILLON : IO-a PASKA KULTURA SEMAJNO

De la dimanĉo,4-an de aprilo I97I,ĝis la vendredo 9-an de aprilo I97I (inkluzive),okazos en la Kastelo "Grésillon" -49 -BAUGE (Francujo) la IO-a Paska Kultura Semajno.

Inter aliaj la plej bonaj studentoj de la esperanto-kurso de la Fakultato de Clermont-Ferrand kaj la agregacia profesoro JANTON estas invititaj.-

La organizanto de la venonta Paska Kultura Semajno estas S-ro René LLECH-WALTER,Honora Prezidanto de U.F.E.,5,Quai Vauban,66-PERPIGNAN, kiu respondos al ĉiuj informaj petoj.-

R . LL-W.

<u>REDAKTISTA NOTO</u> : La plejparto el niaj samfederacianoj ricevis cirkul-leteron el nia prezidanto, je la 5-a de septembro I970, pri tiu grava Gresijona Semajno.-S-ro Llech-Walter proponas al ĉiu el ni -aŭ al ĉiu grupo- partopreni la elspezon dank'al donaco da 50 F (I/2 lernanto) aŭ IOO F ( I lernanto),permesonte al tiuj studentoj ĉeesti,malmultkoste,la Paskan Organizadon.- (Sendu la kontribuaĵon al C.C.P. 855-35 Paris = Union Française pour l'Esperanto).-

RED.

## DEPARTEMENTA FEDERACIO " G A R D "

-o-o-o-o-o-

### RENKONTIĜO en SOMMIERES

La 24an de Majo, dudek samideanoj el Montpellier, Nîmes, Beaucaire, Le Cailar, Cendras, Alès partoprenis la renkontiĝon en Sommières.-

La vetero estis belega...

Antaŭ la tagmanĝo, niaj geamikoj "malkovris" la plej kuriozajn aspektojn de tiu urbeto : la arkaĵojn de la romana ponto sur kiuj estas konstruita la strato "du Pont" kaj kiujn la tieaj komercistoj uzas kiel "kelojn", kaj la mezepokajn mallarĝajn stratetojn, riĉajn je historiaj memoraĵoj.-Kelkaj "kuraĝuloj" grimpis sur la malnovan turon por ĝui belan panoramon sur la valo de Vidurlo.-

La tagmanĝo, eltirita el sako, okazis sur la teraso de l'kafejo "de l'Esplanade", ĉe la ombro de belegaj platanoj, tute apud la rivero. Kantoj, ŝerc-rakontoj sekvis.-

Posttagmeze, promenante, nia samideanaro atingis Villevielle kaj vizitis la tiean kastelon, belega konstruaĵo el la XVIa jarcento, kies admirindaj ĉambroj tre interesis la vizitantojn.-

Konklude, tre agrabla tago, en simpatia etoso, kiu plie ebligis al ni propagandi por nia lingvo.-

Malpravis la forestantoj ....

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

### EL NIAJ GRUPOJ .......

**A L E S :** " La Libro ESPERANTO .-

Post Sommieres kaj La Grand Combe, ni prezentis en ALES la ekspozicion de nia amiko LENTAIGNE.-

Sekve de invitoj al la ĉefaj superaj lernejoj, en tiu lasta urbo, venis nombraj geliceanoj, kij vere entuziasmiĝis pri la lingvo kaj petis ke ni organizu kurson en la liceo.-Ni klopodas por ke ilia deziro plenumiĝu.

Plie ni varbis kelkajn pliaĝulojn.-

ALESAJ KURSOJ...

Finis la kursoj. Ĉiuj bone laboris. Ni deziras al ĉiuj agrablajn feriojn.- Gis la venonta lernejjaro ...

R . RAYNAUD

**NIMES :** La venonta numero recenzos pri la nova organizado de la kursoj.-Niaj geamikoj partoprenis la internacian kongreson en VIENNE.- La grupo akceptis, je la 22an de septembro, gesamideanojn LESZNAI , el HUGARIO.-Sro Lajos LESZNAI estas fama musikologo, kaj lia prelego tre interesis nian grupanojn.- La juna lernantino de S-ino VOLPELIERE, F-ino Marjolaine SCHLUMPF rakontis lertece ŝian vojaĝon en Britio .-

H. JANNEZ

## PRI LA UNIVERSALA KONGRESO EN VIENO ...

Por la unua fojo en la historio de la Esperantistaj Universalaj Kongresoj,ŝta estro malfermis la kongreson parolante en la internacia lingvo.

Efektive,Prezidento de AŬSTRIO,S-ro Franz JONAS,flue parolas esperanton,kaj lia parolado estis ege ŝatata de la 2.000 delegitoj.

La regiono "Langvedoko-Rusiljono" estis reprezentita de sia Prezidanto,S-ro René LLECH-WALTER,el Perpignan,de sia Vic-Prezidantino, Dok-ino Yvette VIERNE,el Montpellier,de sia Kasisto,S-ro Maurice DELIGNE,el Narbonne,de siaj delegitoj,Ge-roj kaj F-ino BENAZET,el Argelès-sur Mer,S-inoj AUTHIER kaj TERRAL,el Béziers, Ge-roj VOLPELIERE,el NIMES.-

S-ro René LLECH-WALTER,Honora Prezidanto de U.F.E.,gvidis la francan delegacion kiu vizitis la francan ambasadorejon en Vieno.-S-ro Profesoro JANTON,el la Beletra Fakultato de Clermont-Ferrand,ĉeestis kaj raportis al la Ambasadoro pri la bonegaj rezultoj kiujn li ricevis pere de esperanta instruado ĉe la Beletra Fakultato de Clermont-Ferrand.

La venonta U.K. OKAZOS EN LONDONO,dum I97I,kaj en PORTLAND (Usono) dum I972.-Ni esperu ke la Federacio estos ankoraŭ reprezentata.

R . L . W .

-o-o-o-o-o-o-

## LA 4I-a ITALA NACIA KONGRESO....

Estas tro malfrue por disvastigi la informon el nia Samideano J. LANZO (Cannes) kiu estis peranto de tiu kongreso por Francanoj.-Tamen, estas interese recenzi rapide pri tiu originala formulo.-

Jes ja,estis sur la marŝipo "CARIBIA" ke okazis tiu kongreso,antaŭ 3 semajnoj.-La kongresintoj enŝipiĝis,ĉu en la haveno GENES,ĉu,por niaj samlandanoj,en CANNES.-

La surmara kongresejo vizitis la ĉefajn havenojn de la okcidenta mediteraneo,kaj la Insuloj KANARIOJ.-La regionaj sudfrancaj esperantistoj akceptis la italajn kongresintojn en Cannes, la I9-a de septembro.-

RED.

## NI ESTU SERIOZAJ....IOMETE....

### LA PAROLMAŜINO...

Kiam mi forpelis la rubaĵon de mia maŝino,ŝajnis al mi aŭdi "Huf". Tamen,mi dubis ke tiu skribaparato parolu...Sed,ĵus kiam mi denove tre klare aŭdis"H.u..u..f".-Stranga skribmaŝino....Kiu dezirus ĝin aĉeti ? Tia kuriozaĵo estas senvalora...Sin turni al la redakciejo.

H.J.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Roneotypé par la Fédération d'Esperanto Languedoc-Roussillon...
Directeur de la Publication : FRUS Roberto N° 996 Bât. 2 M ZUP / NIMES
Dépôt légal 3ème & 4ème Trimestres I970

I0/I0/70